

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sokr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE
C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 3 F. Abono: 10 F. Kotizo: 2 F. Sume: 12 F. ====
XX

La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de decembro, marto, junio kaj septembro.
XX

---- N° 121 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
*** SANKTA PIO X-a, preĝu por ni. ***

---- JULIO 1979 ----

XX

BILETO DE LA PREZIDANTO.

L' appel aux suffrages de tous les pays intégrés dans l' organisation européenne constitue une étape dans la mutation qui se déroule depuis un quart de siècle; cet événement aura à la fin de ce siècle des conséquences économiques, sociales, culturelles, politiques menant vers un avenir profondément différent de ce que fut le passé pour les nations concernées.

Ceci va poser une fois de plus, pour une assemblée délibérante élue et pour les services qui en assureront le fonctionnement, le problème de la diversité des langues. Une part très importante du budget et des travaux sera consacrée à la traduction des textes, des discours, des dossiers et des documents; l' emploi d' une langue universelle, neutre, effectivement internationale apparaît à l' évidence comme la seule solution logique.

Pour nous qui sommes partisans et pratiquants de cette langue, nous visons au-delà et au-dessus de l' intérêt pratique des organisations officielles: une langue commune doit être le moyen de rapprocher les peuples et de créer les conditions d' une grande et forte solidarité entre les peuples; loin de nuire à l' épanouissement des diverses cultures, elle en serait la sauvegarde à l' intérieur de leur cadre ethnique et géographique.

Est-il concevable que tant d' efforts, tant de recherches, tant de dépenses aient été orientés vers la communication instantanée des faits et des événements à travers les plus grandes distances, et que l' idée de la langue de contact, instrument commun du rapprochement intellectuel et spirituel demeure encore étrangère à la grande majorité?

Pour nous qui sommes engagés dans l' effort pour la diffusion et l' utilisation de l' Esperanto, mais qui voulons mettre ses potentialités au service de la fraternité des hommes porteurs de la Foi chrétienne, nous voulons oeuvrer pour qu' au-dessus de la diversité des cultures, des nécessités économiques, des particularités nationales, la Parole, source d' amour et de paix, soit entendue par tous les peuples participant ainsi à la marche vers l' Unité voulue par le Seigneur.

René-Claude COLAS.

GENERALA KUNVENO EN LILLE (1979)

AGADRAPORTO (S-ro COLAS)

Mi havas ankoraŭ tiun jaron, la honoron prezenti al nia Asocio la agadon de la Francaj Katolikaj Esperantistoj dum la jaro.

Antaŭ ĉio, mi devas gratuli kaj danki la sindonemajn membrojn de nia komitato, pro ilia ekzempla agemo, kune en la ĝenerala movado kaj en nia katolika medio.

S-ro Despiney permesas al mi citi lian gravan partoprenon en U.F.E., kaj liajn altvalorajn zorgojn por la publikigo laŭ la oportuneco de gazetartikoloj. S-ino Vincent laboras por la instruado de la lingvo, por la ekzamenoj kaj ankaŭ por la Esperanta Kulturdomo. P. Bourdon agadas en la kulturaj kaj sociaj medioj en la regiono de Lille, kaj apud grupoj de gejunuloj. P. Degrelle, kiu riĉiĝas nian bultenon per lertaj poemoj, interesiĝas pri la junuloj kaj pri la infanoj kaj gvidas interrilatojn inter infanoj de diversaj landoj.

Mi ne daŭrigos tiun liston, sed mi volas montri kaj esprimi tion: nia movado alportos al ni nur tion, kion ni alportos al la movado, ĉu sur la katolika kaj ekuмена tereno, ĉu en ĉiuj fakoj al kiuj ni apartenas.

Nia komitato kunvenis laŭkutime ĉiun trian monaton, kaj la bulteno regule raportis la protokolojn de niaj laboroj.

Mi memorigas al vi, ke ĉiuj membroj estas bonvenaj kiel aŭskultantoj. Ni varme dankas U.F.E., kiu akceptas nin amike en siaj novaj ejoj; reciproke, estas por ni devo partopreni individue en la kostoj de la organizado de tiu necesega centro.

Niaj klopodoj koncernis precipe la jenajn punktojn:

- la organizado de esperantlingvaj diservoj dum diversaj kongresoj (Clermont-Ferrand, Varna k.a.)
- la propagandon, precipe per flugfolioj direktitaj al la jumaj kristanoj, ĉiam disponeblaj por la samideanoj, kiuj volas disdoni ilin.
- la eldonon de la verko de P. Korytkowski kaj Bourdon; de nun havebla, ĝi estas tre interesa ilo por konigi la internacian lingvon inter la francparolantoj.
- la rilaton kun la franca episkoparo, la katolikaj medioj, la gazetoj kaj revuoj, cele atingi larĝan publikon.
- la rilatojn kun la Centra Oficejo en Romo kaj la organo de IKUE, la monata revuo "Espero Katolika".
- nian trimonatan bultenon, kiu respegulas la vivon de la Asocio.
- siaflanke, P. Degrelle organizas IKEK, internacian ligilon inter geknaboj.

IKUE. Nia franca Asocio akceptas ĉiujn homojn, kiuj konsentas kun niaj statutoj; ne nur esperantistojn, sed ankaŭ simpatiantojn. Sed ni atentigas vin, ke se vi vere volas subteni la internacian agadon, kiu estas nia celo, vi devas individue aliĝi al "Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista", abonante la revuon "Espero Katolika".

La tria numero de EK publikigos la rezulton de la voĉdonado okazinta dum la lastaj monatoj por la renovigo de la Estraro kaj la elektado de nova prezidanto.

Vi trovos en EK informojn pri la venonta kongreso en Luksemburgo (7-14/8/79)

Mi salutas ĉiujn, kiuj laboras por la disvastigo de Esperanto, precipe tiujn, kiuj agas laŭ la propraj celoj, religiaj kaj ekumenaj, de nia asocio. Mi ankaŭ volas kuraĝigi la freŝdatajn samideanojn, kaj ankaŭ la malnovajn, por ke ili perfektigu sian kapablecon kaj perfekte majstru la lingvon. Ĉar ne sufiĉas admiru la simplecon de la gramatiko, sed, se ni vere kredas en la disvolviĝo de la Esperantomovado, ni havas la devon esti prefektaj praktikantoj. Kaj ni uzos tiun kapablecon laŭ la spirito de nia kristaneco por plilarĝigi la rondon de la Amo, de la Frateco, kaj de la Pacemo.

PROTOKOLO DE LA ~~KXXX~~ GENERALA KUNVENO EN LILLE

Ĉeestas 17; petis senkulpigon 6; sendis rajtigilon 12

P. Bourdon bonvenigas en la Dominikana Domo.

S-ro Colas prezentas la agadraporton (v. ĉisupre) unuanime akceptita.

La financa raporto, prezentita de S-ino Vincent unuafoje montras negativan saldon pro la prezo de la presaĵoj. Ŝi insiste apelacias por akurata kotizpago, ĉar la sendo de la rebatleteroj estas ja senutila elspezo. Unuanime, la ĝenerala kunveno aprobas la novan kotiztarifon 15 F ekde la 1-a de januaro 1980, kaj la financan raporton.

./...

LINGVA ANGULO

Kiel kutime respondis S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), GUILLON (G), LE MARQUAND (L) kaj S-ino MICHAU (M). Jen iliaj proponoj:

- 1) élever à la dure: malmilde eduki (B,M), medorloteme eduki (B); severe edukadi (D); energie eduki (G); harde, rigore, severe eduki (L); sendorlote eduki (M).
- 2) facile comme bonjour: infane facilega (B); facila kiel diri "Bonan tagon" (D); tute facilega (G); facile kiel saluti (L); facila kiel saluto (M).
- 3) avoir un faible pour quelqu' un: aparte korinklina al iu, esti aparte korinklina na al iu (B); havi indulgemon al iu (D); privilegie ami iun (G); emi pli favori iun (L); indulgemu al iu, havi inklinon por iu (M).
- 4) il ne faut pas en faire un drame: ne konsideru tion dramu, ne nigriĝu la aferon (B); ne kredu tion tragedianda, tio ne estas vere grava (D); ne taŭgas konsideri tion malfeliĉego (G); tio ne estas dramiginda (L); ne dramigu tion, ne troigu ties gravecon (M).
- 5) fait comme un rat: nepre pereonta, senelireje staranta (B); venkita sen ia dubo (D); nepre kaptota (G); enkaptita kiel rato en kaptilo (L); senpova kiel kaptita rato (M).
- 6) il s' en est fallu de peu: mankis nur hareto, mankis apenaŭ hareto, nur hareto tenis tion (B); tio preskaŭ okazis (D); la malfeliĉo preskaŭ efektiviĝis (G); estis tanĝe, nur ete mankis (L); ĝustatempe evitita (aŭ trafita) (M).
- 7) ne pas se faire faute de: senĝene, ade, ĉiaokaze rimarkigi (B); senhezite agi, plurfoje fari (D); tute ne maltrafi oportunecon (G); ne forgesi, ne neglekti, ne sin deteni de (L); ne sin ĝeni por, ne ŝpari sian penon (M).
- 8) quel faux jeton: kia hipokritulo (B,M), kia perfidulo, fariseo (B); kia sensincera homo (D); kia hipokritemulo (G); kia trompemulo (L).
- 9) pas de faux-semblants: ne ŝajniĝu (B,L), rekte al la afero (B); ne mensogaj ŝajnigoj (D); neniaj fiŝajnoj (G); ŝajniĝoj for (L); ne afektu kontraŭsente, ne ŝajniĝu mensoge (M).
- 10) fendre l' air: tranĉi la aeron (B); rapidegi kvazaŭ sago (D); fendi la aeron (L); kvazaŭfluga trapasi (M).

Tria klasifiko por 1979: 1) S-ro LE MARQUAND (19); 2) S-ino MICHAU (16); 3) en egaleco: S-roj BOURGOIS kaj DAUCHEZ (9); 5) S-ro GUILLON (8).

Novaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgeois je via tradukemo: 1) avoir le feu au derrière; 2) il n' a pas le feu sacré; 3) il n' en fiche pas une ramée; 4) au fil des heures; 5) c' est une fine lame; 6) filer au mez et à la barbe de quelqu' un; 7) il nous a filé entre les doigts; 8) filer le parfait amour; 9) c' est une fine bouche; 10) faire la fine bouche.

INFORMATIONS UTILES POUR LES MAL-VOYANTS

1. Association des bibliothèques sonores 59019 - LILLE CEDEX B.P. 3452

Pour avoir un livre, envoyer 10 F par an + un certificat médical, surtout pour les amblyopes.

2. Donneuse de voix espérantiste: Mme COQUANT 60, rue St-Louis 59100 - ROUBAIX
Tel. (20) 70 39 19

La venonta komitatkunveno okazos la 14-an de oktobro je la 14.30 en Paris
4 bis, rue de la Cerisaie (metrostacio: Bastille).

Ĉiuj anoj estas bonvenaj kiel aŭskultantoj kaj observantoj.

BIBLIAJ NOMOJ (daŭnigo)

ABONIJA (Mia Sinjoro)

"Adoniĵa, Sinjoro, ĉu vi venas kun paco
Al la patrino de l' reĝ'? Ĉu vi havas aferon
Priparolendan kun mi? Spertu mian oferon
Pri helpema preteco kun saĝeca sagaco."

"Mi scias, ke mi estas el la frata palaco
Sed estu miaflanke por forigi suferon
Petante nian majestron doni al mi preferon
Sur ĉiuj enlandanoj ĉe Abiŝagdonaco."

Ne sufiĉas por gajni ricevi konpkliniĝon
Ĝe de potenco maŝto. Ĉar se mankas milda vort'
Vi ekhavas alfronte nur fieran prestiĝon.

"Kion vi do, pastulas rilate al mia sort'?
Panjo, ĉu vi deziras por li la ĉefvertiĝon?
Fide al mia patro, ke li iru al la mort'."

9/2/1978

ADORI

La profeto Jeĝezkel folis vizaĝaltere
Tuj kiam li kontempris la helan fajrobrilon
Kaj aŭskultis ankore la ventflugan konsilon
Alvorti ekzilitojn plorajn apudrivero.

L' persekutanta Saŭlo rajdante sentolere
Sur la minaca vojo por meti mantenilon
Kredaŭdante Jesuon retrovis la humilon
Obee surgenuis amante vivofero.

Kiel Ijob agnoskis, ke li kuloe eraris
En polvo kaj en cindra rekomencis fervoni
Al patra Eternulo, kiu benon preparis.

Kiel Abrahamo sklav', kiu finis aktori
Kliniĝe gloris Dion, ĉiuj pro danko faris
La plej subliman geston de la homo: adari.

DEGRELLE Roger 10/2/1978

=====


MATEMATIKA PROBLEMO, sendita de Eloi MOTILLON

- Kiom estas tri plus kvar?
- Kompreneble, estas sep.
- Ĉu vi ne eraras? Mi opinias, ke estas ok.
- Vi ja eraras!
- Tute ne! Mi tuj provas matematike, ke mi pravas. Nu, vidu!
Mi surmetas tiujn alumetojn sur la tablon. Kiom ili estas?


- Evidente, tri!
- Se mi aldonas kvar alumetojn, kiom estos la sumo?
- Sendube, sep.
- Jen rigardu! Mi aldonas unu, du, tri, kvar alumetojn.



- Kiom estas la rezulto?
- Ok!
- Ĉu mi ne pravas? Tri plus kvar estas ok.




P 10 a




P 10 b


SOLVOJ




P 11




A 15



A 16



A 17



A 18

A 19

A 20

- A. 15 - El tiu ĉi figuro, formetu 2 alumetojn por ke restu nur 2 kvadratoj (kiuj povas esti dimensie malsamaj)
- A. 16 - Jen estas 5 kvadratoj ; formetu 3 alumetojn por ke restu nur 3 kvadratoj.
- A. 17 - El la 16 alumetoj, transloku 4 por ke estu nun 4 kvadratoj similaj al la unuaj.
- A. 18 - Formetu 4 alumetojn por ke restu nur 6 kvadratoj
- A. 19 - Formetu 4 alumetojn por ke restu nur 5 kvadratoj
- A. 20 - El la 24 alumetoj formetu nur 6 alumetojn por ke estu nun 3 kvadratoj (Kiu povas esti dimensie malsamaj).

ELDONA FONDUISO (2-a listo 1979)

4) S-ino MICHAU: 200 F. Sumo: 388 F.
Plej sinceran dankon al ĉiuj donacintoj.

Por helpi P. Bourdon finpigi la presadon de "Une langue internationale pour le monde et pour l' Eglise", vi havas du eblecojn:

1) mendi tiun libron rekte de P. Bourdon 7, av. Salomon 59000-LILLE p.ĉ.k. 1909 49 Y Lille. Prezo afrankite: 1 ekz. 13,50 F; 2 ekz. 25 F; 3 ekz. 35 F; 4 ekz. 47,20 F; 5 ekz. 57,20 F...

2) sendi donacojn por la Eldona Fonduso al Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. 2324 93 N. Rouen.

+++++

NEKROLOGO

Laŭ EK, ni ĵus eksciis la forpason de F-ino Odile Moureaux (M & M). Mem malsana, ŝi meritplene agadis por Esperanto en la malsanula medio. Ni kondolencas al ŝiaj familianoj kaj preĝas por la ripozo de ŝia animo.

+++++

NIA MEMBRARO

Novaj membroj: 2) S-ro VIGNER (I & V); 3) S-ro GOZMAN (Hispanujo); 4) S-to MELIGNON (Nord).

Ni kore bonvenigas ilin en nia modesta rondeto.

Nova dumviva membro: 42) S-ro COLLEU (Hauts-de-Seine)

+++++

TIGRINO KAJ OGROKATO

Japana rakonto tradukita kaj kompilita de ZIN Kiyosi.

En la urbeto, kiu rigardas al granda maro, loĝis du fratinoj. La trajtoj de la pli aĝa estis strangaj, t. e. ŝi havis larĝajn akrajn okulojn, larĝan buŝon kaj la vizaĝkoloro estis nigre-bruna kiel argilidolo elterigita. Plie ŝi havis sangvinan temperamenton, kaj neniu povis timigi ŝin. Do, oni nomis ŝin Tigrino. Malgraŭ tia moknomo ŝi estis bonkora kaj servema al la maljunulinoj en la urbeto. Ŝi estis fiŝisto, ŝi povis pli lerte kapti fiŝojn per kvarbranĉa harpuneto ol viraj fiŝistoj. Dume, la pli juna fratino estis ĝentila, milda kaj pala knabino; ĉiam sidante ŝi nur kudrolaboradis hejme.

Iam, en ilian domon, senhejma kato nigra eniris arbitre kaj loĝadis, kvazaŭ la domo estus ĝia propra. La kato fariĝis tiel granda kiel hundeto, eble pro tio, ke ĝi manĝis multe da fiŝaĵo ĉiutage. Sed la kato estis tre satigita de fiŝaĵo; ĝi ofte kaptis kokinojn kaj manĝis ilin anstataŭ la fiŝaĵon. Post momentoj ĝi ree estis tro satigita de la kokaĵo. Fine, ĝi nur morde tranĉis kolojn de kokinoj unu post la alia. Kompreneble, la najbaro, kiu bredis la kokinojn, plendis pri tio kontraŭ la fratinoj. Ĉiam, kiam la pli juna fratino aŭdis la plendon de la najbaro, ŝi nur petis pardonon per tremanta voĉo. Vespere, Tigrino aŭdinte tion rapidmove kaptis la nukon de la kato kaj ĵetegis ĝin sur senplankan parton. "Gjaŭo!" la kato kriaĉis; post momento ĝi povis apenaŭ stari per tri piedoj.

La kato estis ofte ĵetegita; pro tio, tuj kiam Tigrino revenis hejmen, ĝi timeme forkuris el la domo, kaj en la sekvanta tago ĝi ŝtelmove reeniris.

Iun tagon la fratino kudrolaboris sidante apud la fajrejo en la kuirejo. La kato komforte dormetadis kaŭre apud ŝi. Ĉio estis tute kvieta kaj nenia sono estis aŭdebla krom la ŝpinado de la kato. Tiam, la kato vekigis kaj ĉirkaŭrigardis per la du grandaj okuloj, kvazaŭ ĝi ion ekpensis. "Filineto", alparolis la kato per la homa lingvo. La fratino konsternigis kaj paliĝis, ŝi respondis per tremanta voĉo: "Kio?" "Vi estas soleca en la tago, mi prezentu al vi la dancon lernitan." Dirinte tion, la kato saltis sur la komodon kaj alportis mantukon kun punktita desegnaĵo. Ĝi kovris sian kapon per la tuko, ekstaris sur la postaj kruroj kaj ekdancis kantante:

"Ne min plu insultu, nomante min Kataĉo.

Kataĉo povas surmeti getaĵojn sur du piedoj.

Kataĉo povas apogi sin sur promenbastono.

./...

Kataĉo povas sin vesti per tinkturita banvesto.
Miaù, miaù, njago, njan!"

Tiel dancis kan kantis la kato. "Ĉu la danco vin amuzis? Mi dancu ankoraŭfoje." Denove la kato dancis. Fininte la dancon, la kato deprenis la mantukon de sur la kapo kaj ĝin faldis kaj ree metis sur la komodon. "Filineto, vi ne parolu al Tigrino pri mia danco! Se vi parolos, mi vin mortigos, nepre!" Poste kiel antaŭe ĝi komencis dormetadi apud la fajrejo. Vespere, Tigrino revenis hejmen; vidante la mienon de sia fratino, ŝi demandis: "Kial vi tiel paliĝas? Ĉu vi estas malsana?" Sed la fratino nenion respondis, kaj pli frue enlitiĝis. Tigrino maltrankvile demandis kelke da fojoj, sed ŝi kiel antaŭe neniel parolis pri la kaŭzo. Malgraŭ ke la nokto malfruiĝis, ŝiaj okuloj restis malfermitaj. "Ĉu kato estas dome?" fine la fratino diris, "vole serĉu ĝin." Tigrino ellitiĝis kaj serĉis la katon. "Nenie troviĝas Kataĉo. Denove la aĉulo mortigis kokinojn?" Ŝi skuis la kapon kaj per tremanta voĉo ekparolis pri la afero. "Kato mortigos min nepre," ŝi malĝoje ploris. Tigrino ekkoleris, koleregis. "Mi eltiru la kapon el ĝia korpo morgaŭ," ŝi laŭte kriis.

En la sekvanta mateno Tigrino serĉis la katon en kaj ĉirkaŭ la domo kaj tra la urbeto, sed ne povis ĝin trovi. Tial, ŝi najlis ĉiujn fenestrojn kaj pordojn, laste la trairejon ekster la domo. Vespere, Tigrino pli frue revenis hejmen. Ŝi frapis la pordon, frapadis, sed nenio estis aŭdebla. Rapide ŝi malnajlis kaj enpaŝis en la domon - tie trovis Tigrino ŝian kapon morde tranĉitan for de la korpo.

(daŭrigota)

KOTIZTABELO 1979

IKUE kun "Espero Katolika" 48 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2555 38 L.

* * * * *

ACFE KUN "Franca Katolika Esperantista" 12 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 6 F
Bonfaranto 60 F
Dumviva membro 240 F

UFE kun "Revue Française" 80 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 110 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" 35 F
Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

Dépôt légal: 3ème trimestre 1979 !!! Polycopié par F. M. C.
Papier de presse n° 34 745 !!! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie
Directeur-gérant: Gaston Véron !!! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE